I-0891/2


# ESPERANTO-SERVO

AKTUALA INFORMA BULTENO DE PRAHA

Vol. 2. No 1 | JANUARO 1949


Al la legantaro de „Esperanto-Servo" la redakcio deziras feliĉan novan jaron!



*DRO JAROMÍR DOLANSKÝ*
*Čs. ministro por financoj*

## PROKLAMO DE LA PLENUMCENTRO DE L'TUTMONDA SINDIKATA FEDERACIO DE LA TUTMONDA SINDIKATA MEMBRARO AL LA TUTA LABORANTARO

„Laboristoj kaj laboristinoj! La internacia laborista unueco estas minacata. La reprezentantoj de l'brita kongreso de sindikatoj (TUC) kaj de l'amerika kongreso de industriaj organizoj starigis la plenumcentran komitaton de la Tutmonda Sindikata Federacio antaŭ la elekton: aŭ tuj ĉesigi la agadon de l'Federacio, aŭ likvidi ĝin laŭ la propono de CIO. Samtempe ili minacis, ke en mala kazo, ili forlasos la Tutmondan Sindikatan Federacion. Per tio ili provis trudi sian volon al 67 naciaj sindikataj centroj, kiuj unuiĝas la laborantojn el la tuta mondo sen diferenco de politika, religia kaj filozofia konvinkoj. La plimulto de la plenumcentro proponis, ke la brita propono estu transdonita al la ĝenerala konsilantaro kaj al kongreso de l'Tutmonda Sindikata Federacio, ĉar tio tuŝas la ekziston de la internacia sindikata unueco mem. Sed la reprezentantoj de la brita kaj amerika sindikataroj deklaris, ke ili ne volas kalkuli je la opinio de la plimulto, kaj kune kun la reprezentantoj de la holandaj sindikatoj forlasis la kunsidejon. Per tio ili pruvis, ke ili energie malakceptas pridiskuti la eblon de la plej akceptebla decido, kiel konservi la unuecon de la sindikatoj. La plenumcentro tamen daŭrigas sian agadon sub prezidado de kamarado Di Vittorio, la vicprezidanto de la Tutmonda Sindikata Federacio.

Laboristoj kaj laboristinoj! La Tutmonda Sindikat-Federacio estas komuna posedaĵo de ĉiuj laborantoj, estas la portanto de ĉiuj viaj esperoj. La Federacio fiksis en la konstitucio kiel sian celon organizi komunan batalon de la sindikatoj ĉiunaciaj kontraŭ ĉiu ajn minaco kaj atako kontraŭ la ekonomia kaj sociala rajtoj de ĉiuj laborantoj kaj iliaj demokrataj liberoj, sekurigi laboron por ĉiu, plialtigadi la salajrojn kaj la vivonivelon, mallongigi la labortagon, batali por sociala asekuro de ĉiuj laborantoj kaj ties familianoj dum senlaboreco kaj malsano, batali por maljunaĝ-asekuro kaj por aliaj plibonigoj en la sociala situacio de la laborantoj, samtempe kun ili batali por definitiva detruo de la faŝismorestoj en ĉiuj formoj, senĉese batali kontraŭ milito kaj ties kaŭzoj por daŭra kaj firma paco, por protekto al la interesoj de la laborantoj en ĉiuj internaciaj organizaĵoj. Dum sia trijara agado la Tutmonda Sindikat-Federacio savis de morto multajn homojn en multaj ŝtatoj, niajn batalkamaradojn. La tutmonda Sindikat-Federacio povus esti farinta multe pli, se ĝia agado ne estus intence bremsata ĝuste de tiuj, kiuj nun proponis ĉesigi ĝian tutan agadon.

La ĉefaj reprezentantoj de la brita sindikatkonsilantaro, prezentante siajn sugestojn, ne komprenis la profundajn ŝanĝojn, kiuj okazis post la dua mondmilito en la batalo por sendependeco de la nacioj kaj en la evoluado de la sindikata movado. En multaj ŝtatoj la sindikatoj fariĝis amas-organizaĵoj. Ĝuste sub influo de la neĝusta pritakso de la nuna situacio en la sindikatoj, la estroj de la britaj Trade-Unions ankoraŭ opinias, ke ili povas entrudi siajn proprajn konceptojn al la plimulto kaj ne devas klopodi pri frata kunlaborado kun la kolegoj surbaze de egalrajteco kaj de kondiĉoj ĝenerale akcepteblaj.

La plenumcentro de TSF deklaras: la Tutmonda Sindikat-Federacio ankoraŭ ĉiam ekzistas! Ĝi malhelpas neniun nacian organizaĵon aniĝi al la Federacio. Ĝi ekzistas plu, ĉar la gelaboristoj ĉie en la mondo bezonas protekton kaj unuecon. Malfortigi la laboristan klason en la nuna tempo, klopodi disbati ĝian internacian unuecon, tio estas krima akto, kies iniciatantoj estos severe juĝataj de la tuta laboranta popolo.

Leteroj jam venas el ĉiuj ŝtatoj, kiuj konfirmas neceson konservi kaj plifirmigi la Tutmondan Sindikat-Federacion.

Gelaboristoj!! La celoj de la Tutmonda Sindikat-Federacio estas grandaj kaj noblaj. Ili esprimas la komunajn interesojn de ĉiuj man- kaj spiritlaborantoj. Por atingi tiujn celojn necesas plifirmigadi la unuecon del'tutmonda laborantaro, firmigi kaj disvolvi la tutmondan federacion de sindikatoj. Malgraŭ ĉia politika manovrado kontraŭ la federacio, ĝi vivos kaj kreskos!! La laborista klaso tutmonda estis bone instruita en la dua mondmilito. Ĝi klare ekkomprenis, ke ĝia event. malfortigo malfermos la vojon por faŝismo kaj ebligos novajn militojn. Sindikatanoj, komprenu bone la gravecon de la situacio!

Se vi ne volas rigardi, kiel naskiĝas nov-forma faŝismo, se vi ne volas novan mondmiliton, vi firmigu viajn vicojn, klopodu pri la unueco de la tutmonda laborista klaso. Ĉar ĝuste en tio estas la ĉefa fonto de espero je paco, demokratio kaj progreso.

Ne kredu la mensogajn atakojn kontraŭ la Tutmonda Sindikat-Federacio! Laborantoj en la tuta mondo, konservu vian kontakton kun la Federacio! Batalu por la postuloj, eldiritaj de la Tutmonda Sindikata-Federacio! Vivu internacia unueco de laborantoj! Vivu la Tutmonda Sindikat-Federacio!!" — —

Tio estas deklaro de la plenumcentro de l'Tutmonda Sindikat-Federacio al la laborantaro de la tuta mondo.

## REFORMO DE LA PUBLIKA ADMINISTRADO EN ĈSR

La publika administrado en la lasta tempo travivas gravajn ŝanĝojn. La ŝtata administra aparato, kiun ni heredis de la unua respubliko, tute ne povis konveni al la popoldemokratia reĝimo. Estus granda eraro kredi, ke tiu ĉi malnova aparato estis konstruita en la jaro 1918, kiam la ĉs. popolo liberiĝis. Tio ne estas ĝusta. La komenco de tiu ĉi administra sistemo havas siajn radikojn jam en la duono de la pasinta jarcento, do en tempo de la burĝdemokratia revolucio en la estinta Aŭstrohungara monarkio. Do kiel vi povas konstati, nia publika administrado jubileas respektindan aĝon de 100 jaroj. La unua ĉs. respubliko transprenis ĉi tiun malnovan administradon kaj faris en ĝi preskaŭ neniujn ŝanĝojn. Ankaŭ Hitler trovis ĝin dum la okupacio al si tute konvena kaj nenion en ĝi ŝanĝis. Ĉiuj ĝisnunaj reĝimoj trovis en ĝi komunan avantaĝon, t. e. ke la minorito povis subpremi la majoriton. Estas do memkompreneble, ke tia aparato estas tute malkonvena al la reĝimo popoldemokratia, kiu bazas sian ekziston sur la plimulto de la nacio, de la tuta laboranta popolo. La principan reorganizon de la malnovtipa ŝtata aparato ni faris en nova Ĉeĥoslovakio jam en la jaro 1945, tuj post la liberiĝo. La estintajn burokratajn organojn ni anstataŭis per la naciaj komitatoj tio estas per funkciantoj de la popolo elektataj, de la popolo kontrolataj kaj de la popolo revokeblaj. La oficistoj fariĝis plenumorganoj de la popolaj reprezentantoj, kiuj decidas, estante al tio rajtigitaj. Tiamaniere estis metitaj la fundamentoj al la nova popola administrado. Sed la plua konstruado de la nova ŝtata aparato estis bremsata kaj sabotita de la ekspluatantaj elementoj, kiuj konscie servis al la ideo restarigi la malnovan sistemon administran, la malnovan reĝimon. Nur la februaraj okazintaĵoj en la pasinta jaro ebligis daŭrigi la vojon, kiun la popolo trovis en majo de la revolucia jaro 1945. Do kiaj estas la ĉefaj principoj, laŭ kiuj ni reorganizas la ŝtatan aparaton de Ĉeĥoslovakio?

Unue: Ni disvastigas la popolan bazon de la tuta administrado. Krom la tiel nomata politika administrado ni subigas al la naciaj komitatoj ankaŭ multajn aliajn funkciojn de la publika administrado. La plej gravaj el ili estas nun la oficoj de la financsektoro kaj de la ofico zorganta pri la laboro, ĉar tiuj ne plu estas burokrataj organoj.

Due: Ni praktikas ampleksan decentrigadon de la administrado. Ni fermas la grandajn landajn oficojn kaj la administradon, en ili koncentritan, ni metas en la manojn de la popolo de 19 regionoj. Laŭ la samaj principoj ni reorganizas ankaŭ la distriktojn. Ni nomis 35 novajn distriktojn kaj plue ni dotis la distriktojn tiel, ke ili estu pli kapablaj, pli rapidaj kaj pli produktivaj. Nature ĉefe pro tio, ke ili estu tute intime kun la loĝantaro kaj povu esti de la popolo pli bone kontrolataj.

Trie: Ni prenas la laborkompetenton de la pli altaj organoj kaj transdonas ĝin al organoj malpli altaj, por ke la tuta administrado estu en la naciaj komitatoj kaj en la ministerioj restu nur ĝenerale kompetenteco direkta, kontrola kaj normodona.

Kvare: Ni plisimpligas la metodon de la dejorado en la oficoj. Ni fiksas novajn, pli simplajn labormetodojn, forigas la burokratismon el la ŝtata aparato kaj tiamaniere efektivigas la principon, esprimitan de la respublika prezidento Gottwald, ke „La ofico devas servi al la popolo kaj ne la popolo al la ofico"

Kvine: Ni forigas el la oficoj la skeletiĝintajn burokratojn, kiuj perdis la kontakton kun la popolo, kaj sur iliajn lokojn ni destinas junajn novajn oficistojn, kiuj laboras intime kun la laboranta popolo.

Sese: En la novan ŝtatan aparaton de ĈSR ni enkondukas la sistemon de persona respondeco. Do apud la granda kompetenteco de la kolektivoj ni praktikas ankaŭ la pli vastan kompetentecon de unuopuloj, kiuj sekvé de tio havas pli grandan respondecon.

Do kiel vi povis kostati, la plej karakteriza trajto de la reorganizado de la ŝtata aparato en Ĉeĥoslovakio estas tiu, ke ni transdonas la ŝtatan administradon en la manojn de la laboranta popolo. En ĝia mano ĝi fariĝos ilo, kiu plirapidigos la evoluon de nia respubliko al socialismo, al pli bona ekonomia, sociala kaj kultura vivo.

### ĈEĤOSLOVAKAJ SINDIKATANOJ PLEDAS POR LA SOLIDARECO DE ĈIUJ LABORANTOJ DE LA MONDO

Sian anecon en la Tutmonda Sindikat-Federacio akcentas la Sindikata movado de ĈSR, kiu rajtas paroli en la nomo de 3 milionoj da organizitaj sindikatanoj. Ĉiutage venas novaj kaj novaj leteroj de la ĉs. sindikatanoj, kiuj akre protestas kontraŭ la rompigaj sugestoj kaj planoj de la okcidentaj kapitalistaj rondoj. Surbaze de tiuj ĉi protestoj sendis la Centra Sindikata Konsilantaro de ĈSR protest-telegramon al la ĝenerala sekretario de TSF en Parizo Louis Saillant, en kiu oni interalie apelaciis, ke oni ne permesu la detruadon de Tutmonda Sindikat-Federacio, kiu estas komuna ŝipo de ĉiuj laborantoj de la mondo. Ĉs. sindikatanoj postulas, ke TSF ankoraŭ pli energie batalu por la plifirmigo de paco, progreso kaj ĉiuj rajtoj de la laborantaj homoj, batalantaj por la plifirmigo de la justeco. En la konstruado de la unueco de l'Tutmonda laborantaro promesas la ĉs. sindikatanoj ĉiun eblan helpon al Tutmonda Sindikat-Federacio.

## ĈS. BUDĜETO POR LA JARO 1949

Ĉs. ministro por financoj Dr Jaromír Dolanský prezentis la 5an de januaro al la ĉs. Nacia Parlamento la ŝtatan budĝeton por la jaro 1949.

En ĉiu ŝtata reĝimo estas la ŝtata budĝeto la plej fidinda spegulo, en kiu respeguliĝas la nacia ekonomio, la tuta ekonomia kaj politika konstruado kaj situacio de la ŝtato. Certe alia estas budĝeto de kapitalista ŝtato kaj alia estas la budĝeto de ŝtato socialista. Tial ankaŭ la aspekto de la ĉs. ŝtata budĝeto estas alia, ĉar ĈSR estas ŝtato celanta al socialismo. La ĉs. budĝeto por la jaro 1949 estas esprimo de la progresanta, ekonomia kaj politika konsolidado. Tiun ĉi konsolidadon de la ŝtato pruvas ankaŭ la plenumita dujara plano 1947—1948, kiu estis plenumita je 101'2%. Pro tio plialtiĝis la industria produktado en ĈSR je 110% kompare kun la nivelo antaŭmilita. Tiun ĉi plialtigon de la produktado celas ankaŭ la komencita 5-jara plano de la ekonomia disvolviĝo de ĈSR kaj oni atendas, ke la konsumo de la loĝantaro plialtiĝos je 35%. Ĝis nun ĉiuj ĉs. budĝetoj laboris kun multmiliardaj deficitoj. Tiu ĉi budĝeto de post la liberiĝo estas la unua, kiu ne enhavas deficiton, ĉar en ĝi estas la en-kaj elspezoj ekvilibraj. Tio estas granda sukceso de la planado, ĉar en la antaŭmilita kapitalista Ĉeĥoslovakio post la unua mondmilito estis la ŝtata budĝeto ekvilibrita nur post 8 jaroj. Do la budĝeto havas ekvilibrajn enspezojn kaj elspezojn en sumo de 89,3 miliardoj da Kĉs. El la elspezoj oni volas dediĉi 24% al la investado de la publikaj kaj ŝtataj entreprenoj kaj 29% al celoj resanigaj kaj sociaIaj. Al celoj de la nacia defendo kaj al aparato sekureca oni dediĉas nur 9 procentojn. En la kapitalistaj ŝtatoj la ĵurnaloj ofte akcentas, ke popoldemokrataj reĝimoj ne multe elspezas por celoj lernejaj kaj edukaj. La ĉs. ministerio de instruado, scienco kaj arto havos dispone en la jaro 1949 entute 8 miliardojn 568 milionojn, t. e. preskaŭ 10% de la tuta budĝeto. La budĝetoj de kapitalistaj ŝtatoj havas nature alian aspekton, kiu plene servas al la karaktero de kapitalista ŝtato. Tia budĝeto estas ilo de la sociala subpremado al la laboranta popolo, kiu devas porti sur sia dorso la tutan ŝtatan kapitalistan aparaton kaj kovri ĝiajn elspezojn.

Sed tia kapitalista budĝeto respeguliĝas ankaŭ la timon pro la eblaj ekonomiaj krizoj, kion oni volas forigi por la preparado de la militoj, per ekipado de novaj armiloj. Pro tio ekz. USONO dediĉis en sia budĝeto 1948 preskaŭ 30% de la budĝeto al celoj militaj, dume al celoj sociaIaj oni disponigas nur 5¾%. En la jaro 1949 dediĉas USONO al celoj militistaj 14 miliardojn da dolaroj kaj al celoj klerigaj oni dediĉas nur 250 milionojn da dolaroj. Granda Britujo dediĉis en la jaro 1948 al celoj militistaj 23¼% de sia budĝeto kaj al celoj sociaIaj, do al la laborista klaso, oni disponigas nur 6⅔% de la budĝeto. Francio en sia budĝeto por la jaro 1949 dediĉas 500 miliardojn da frankoj, t. e. 40% al celoj militistaj, al la armiligado. La saman bildon prezentas al vi la budĝetoj de la ceteraj kapitalistaj ŝtatoj. La ĉs. unua ekvilibra budĝeto servas unuavice al la popolo. La ekvilibro de la budĝeto estas kreita reale ne nur pro formo. Ĝi estas reala tial, ĉar ĝi estas parto de la tutŝtata ekonomia plano, kiu celas progresforme efektivigi la ekvilibron de la tuta ĉs. ekonomio, do ekvilibri ankaŭ la enspezojn kaj elspezojn de la loĝantaro.

Tio efektiviĝas nur dank' al la konstante kreskanta produktado, kio ebligos fine, ke la skalo de la gaĝoj kaj salajroj korespondos sume kun la prezoj de la varo sur la ĉs. merkato.

Kiel la plej grava regulanto tiucela estas la nova sistemo de la neperiodaj impostoj. Per tiu ĉi nova sistemo amasiĝas en la ŝtata budĝeto la kapitalo, bezona al la investado, kaj per tio samtempe oni reguligas la konsumado de la merkato. Tiel defendas sin la ŝtato kontraŭ la inflacio.

La unua ĉs. ekvilibra budĝeto por la jaro 1949 ilustras nur parton de la tuta ĉs. ekonomia politiko. Oni vidas ĝin en kadro nur de unu jaro, kiel kreskos la ekonomia progreso, kiu dum la 5-jara plano devas konstrui pli bonan bazon de la sektoro industria kaj agrikultura; sed ankaŭ

en aliaj sektoroj okazos grandaj ŝanĝoj, kiuj igos, ke la nacia enspezo de ĉiu unuopulo pligrandiĝos je 50%. Tio estas la unusola celo de la konstanta, progresema plialtigado de la bonfarto de ĉiuj laborantaj homoj en ĈSR, kiu celas al socialismo.

En la nunaj tagoj la Nacia parlamento pridiskutis la unuopajn sektorojn de la budĝeto kaj la reprezentantoj de la popolo, la deputitoj, ĝojas, ke ili povis pridiskuti budĝeton, kiu estas ekvilibra kaj garantias al la laboranta popolo ĝian bonfarton.

## NOVAJ PLANOJ DE ĈSR

La pasinta jaro estas jam malantaŭ ni kaj ni en Ĉeĥoslovakio, same kiel vi, kun nova kredo eniras la novan jaron 1949an. Ni eniras ĝin kun novaj grandaj planoj, pensante pri unu: pri daŭra kaj efektiva paco, pri tio, ke ni povu trankvile kaj ne malhelpate daŭrigi la konstruadon de nia lando — la konstruadon de socialismo. Ankaŭ vi ĉie, kie vi vivas kaj laboras, batalas kune kun ni por la sama afero: por paco, por demokratio, por rajto kaj vere libera vivo, vivo hominda. Al vi, karaj legantoj en Usono aŭ en Anglio, Francio kaj Italio kaj en la kapitalistaj landoj ĝenerale, apartenas multe pli malfacila tasko: vi devas krom tio batali kontraŭ via propra reakcio, kiu nun regas en viaj landoj kaj kiu ĉiupove bremsas kreadon de vere justa socio, kiu instigas vin al nova milito. Kredu, ke ni en Ĉeĥoslovakia kune kun milionoj da homoj el Soveta unio kaj el la landoj popoldemokrataj estas per niaj koroj kaj mensoj ĉe vi en tiu batalo. Kaj ne nur per vortoj, sed ankaŭ per sentoj. Ankaŭ per agoj. Superante la egajn malfacilaĵojn, kiujn lasis al ni la sesjara okupado al nia lando, la kapitalista heredaĵo kaj nia reakcio deantaŭ februaro, ni konstruas de tago al tago pli justan socian ordon. Ni konstruas novajn fabrikojn kaj uzinojn, infanvartejojn k lernejojn, bibliotekojn k malsanulejojn, parkojn k domojn de ripozo. Ni estigas novan rilaton de homo al homo, novan rilaton de homo al laboro, novan rilaton de homo al la socio, en kiu la popolo mem regas.

## NOVA DISTRIBUA SISTEMO EN ĈSR

Ĉeĥoslovakio komencis sistemon de la privilegata (protekta) provizado per la varo, destinita al la laboristaro kaj al ĉiuj salajrodependaj homoj. Tiun ĉi gravan ŝanĝon, kiun la ĉs. civitanaro jam atendis pli longan tempon, anoncis ĉs. ministro de la financoj Dro Jaromír Dolanský, komentinte en la nacia parlamento la budĝeton por la jaro 1949. La nova sistemo pri la vara distribuado estas budĝetita durele: baza varo, vivbezona, estas ricevebla por la malaltaj prezoj, alia varo, libera, por la altaj prezoj. Ministro Dolanský signis ĉi tiujn novajn aranĝojn kiel la unuan paŝon al la sistema plibonigado kaj la komencon de la pludaŭra nuligado de l' porciuma sistemo. Tion ĉi ebligis antaŭ ĉio pli bona produktado de kelkaj industriaj produktaĵoj. Ĉsl. laboristoj plenumis la 2-jaran planon je 101'2%; jam nun la ĉsl. produktado estas je 10% pli alta ol ĝi estis en la jaroj antaŭmilitaj kaj tiu ĉi kvoto dum la 5-jara plano sisteme plialtiĝos. Sed ĉar ne estas ankoraŭ eble ĉiujn civitanojn kontentigi per la varo, kiun povus nia merkato tute bone konsumi, ne estas eble tute rifuzi la porciuman sistemon; sed la ĝisnuna sistemo ne plu estas konvena. Ne estas fakte justa, ke la laboristo kaj eta kampisto ricevu la saman kvanton da varo kiel la riĉulo kaj spekulacianto. „Estas konate, ke la riĉuloj kaj spekulaciantoj aĉetadis akapare. Tiamaniere ili forprenis la varon al la neriĉaj homoj laborantaj", akcentis ministro Dolanský. Tion ĉi klare pruvis la antaŭnelongaj kontroloj en la magazenoj de la komercistoj. De nun la laboristoj, etkampistoj kaj la dungitoj ĝenerale ricevados la varon teksan, ledan, la biciklojn kaj motociklojn kaj multajn aliajn artiklojn por la malalta prezo. La kampistoj ricevos la vestkuponaron por la aĉetado de vestaĵoj kaj ŝuoj nur, se ili posedas ne pli ol 15 hektarojn da grundo kaj plenumas sian semadoplanon kaj fordonas en ordo la bezonajn grenokontingentojn. Novan vestkuponaron ricevos ankaŭ ĉiuj ŝtataj, publikaj kaj ceteraj dungitoj, emerituloj, altlernejaj studentoj, artistoj kaj la familianoj de la tuta loĝantaro. Krom tio ricevos la vestkuponaron ankaŭ ĉiuj infanoj ĝis la unua jaro senescepte. La ceteraj kategorioj de la loĝantaro, do la privatuloj, privataj entreprenantoj, grandaj kampistoj kaj tiuj etkampistoj, kiuj ne plenumis siajn devigajn kontingentojn pri viando, pano, terpomoj ktp., devos aĉetadi la multekostan varon sur la libera merkato. Samtempe la liberan varon, tio estas la multekostan varon, vendados nur ŝtataj komercejoj kaj la kooperativoj. Privataj komercistoj vendados la ceteran varon, kiu estos havebla nur kontraŭ la kuponoj kaj por nealta prezo. La prezo de la libera varo estos ŝarĝata per alta imposto ĝenerale, tio estas per imposto nerekta, el kies profito la ŝtato helpos reguligi la ceterajn prezojn kaj la fluktuadon de la libera varo. Laŭ tio, kiom proporcie kreskos la produktado, la ŝtato samegale malaltigados la prezojn de la libera varo. Memkompreneble la laboristoj, ĉiuj dungitoj kaj aliaj povas ankaŭ aĉeti, se ili trovos la bezonon fari tion, la varon por la alta prezo. Tiamaniere fariĝas la nova aranĝo de la prezoj forta ilo, kiu reguligos la plialtigon de la produktado; ĉiu plibonigos sian laboron por pli multe gajni kaj povi ankaŭ aĉeti la liberan varon. Ĝenerale la nova prezaro plialtigos la vivnivelon de la loĝantaro. En sia komentario al la proponitaj aranĝoj ministro de financoj Dro Dolanský akcentis la spertojn el la kapitalistaj ŝtatoj. La kapitalistoj certe liberigus ĉiun varon, eĉ se ĝi ne tro sufiĉus. Nature la prezoj rapide kaj nekontroleble kreskus kiel en Francio kaj Italio. La salajroj multe ne estus kompareblaj kun la altaj prezoj. Do certe nur la riĉuloj povus aĉeti, kion ili dezirus, kaj la laboristoj povus aĉeti nek la plej urĝajn vivbezonajojn. Sed en Ĉeĥoslovakio la sistemo, defendanta la laborantan homon, donas al li, al la laboristo kaj etkampisto, la eblon salajre multeprofiti, kiam li diligente laboras; krom tio li povas aĉeti la varon liberan, al kiu li povas uzi ankaŭ la varon, kiun li ricevas kontraŭ la kuponoj je malaltaj prezoj. Sed samtempe tiu ĉi sistemo ebligos malaktivigi la kapitalistajn elementojn, kiuj estos ekonomie bremsataj kaj per la forĉerpado de la kapitalo por la altaj prezoj tiamaniere fordonos la kapitalon al la laboranta popolo, al kiu ili ĝin siatempe forprenis. La kapitalistoj redonos tiamaniere la profitojn, kiujn ili elsuĉis el la popolo. Tiel estos subfosata la bazo de ilia klasa ekzistado. La spekulaciantoj, kiuj vivis el la akaparaj profitoj, estas tiamaniere peze frapitaj, ĉar neniu plu povas kalkuli je tio, ke li povus sukcese akapare ekzisti.

La ŝtato uzos la kapitalon, gajnitan el la altaj prezoj, por la investado de la 5-jara plano, financante riĉe la evoluon de la ĉsl. ekonomio, kio donos denove la prosperon kaj bonfarton al la laboranta popolo de Ĉeĥoslovakio.

● La multsukcesa nacia artisto de USSR, marionetisto Obrazcov, kiu kun sia multnombra kolektivo montris sian arton per la marioneta teatro en multaj lokoj de ĈSR, revenis jam Sovetunion. En ĈSR akompanis lin la ĉs. nacia artisto Skupa, reprezentanto de ĉs. marioneta teatro. Artisto Obrazcov dankis per sia telegramo al ĉs. ministro por informoj kaj klerigo Václav Kopecký, kies gasto li estis, por la amika akcepto, per kiu lin honoris la ĉs. popolo. Ĉs marionetisto prof. Skupa kun siaj marionetoj „Spejbl k Hurvínek" estas en la mondo multe konata.

● En la jaro 1948 transportis Ĉsl. Aerolinioj 116 mil. vojaĝantojn kaj 3,750.000 kg da pakaĵo kaj varo diversspeca.

● Dum la 5-jara plano dediĉos ĈSR 48 miliardojn al la kulturaj celoj kaj lernejoj. 10 miliardojn al tiu ĉi celo disponigas la investoprogramo kaj 38 miliardojn ĉerpos la lernejoj kaj la kultura sektoro el tutŝtataj elspezoj entreprenaj. Tian sumon por la kulturo de la ĉs. popolo oni ankoraŭ neniam en la pasinteco elspezis. La popolo bonvenas tian subtenon al la kultura vivo de Ĉeĥoslovakio!

● Nun la ĉs. altlernejoj fariĝas loko, kie povas studi ankaŭ la talentigitaj de la laborista klaso, kio pli frue estis eble nur limigite. Paŝo post paŝo venos la fakuloj el la laborista klaso ĉien sur la gravajn lokojn, kie la reakcia inteligentaro perfidis la laboron, la estimon al la laborista klaso. Ne povas kalkuli, ke restos tiu ĉe sia posteno, kiu apogos sin nur je sia faka scio kaj politike restas pasiva. Ĉsl. popolo donis sian sorton en la manon de la Marxleninisma scienco.

● Internacia printempa foiro de Praha okazos de la 13a ĝis la 20 de marto 1949. Ĉiuj fremdlandaj komercistoj-aĉetontoj ricevos vizon baze de la aliĝo al la foiro de Praha; la formalaĵoj estos senbarilaj kaj minimumaj. La printempa foiro 1949 estas la unua dum la 5-jara plano kaj la vizitanto povas tuj komence instrui sin pri la ĉs. produktado en la sekvontaj kvin jaroj, ĉar en la foiro de Praha estos reprezentataj ĉiuj sektoroj de la industrio en ĈSR. Tiuj sektoroj, kiuj laboras ekskluzive por la eksporto, prezentos ĉiujn siajn produktojn dum la printempa foiro de Praha. Ili estos reprezentataj senescepte. Specialaĵo karakteriza estos la nunjara „konkurso de la novaĵoj". Konkursi povas nur tiaj novaĵoj de la foiro, kiuj havas praktikan celon kaj sencon prefere ekonomian, kiuj estos teknike perfektaj kaj donas eblon de ekonomia fabrikado. Ili devas esti ĉarme ekipitaj kaj esti komerce bone uzotaj. La plej valoraj eltrovaĵoj estos rekompencataj per la premioj.

● En Olomouc, estis malfermita nova studĉambro de „Ĉs. radio". La malfermo estas plua paŝo al la decentraligo de la laboro sur kampo kultura, kiun ĈSR praktikas. Post la revolucio estis en Olomouc instalita nova simfonia orkestro, opero kaj multaj kulturaj institucioj, kiuj nun havas la eblon labori en la nova studejo de Ĉs. radio.

● Marde la 25an de januaro 1949 mortis en Praha unu el la plej eminentaj reprezentantoj de la samtempa ĉs. muziko Emil AXMAN, estante 62 jara. En la publika vivo de ĈSR laboris la mortinta komponisto intense en la „Societo por moderna muziko".

● Ĉs. fandejoj per sia konstanta plenumado de la plano super 100% pruvas, ke ilia tria loko sur la skalo de la dujara plano estas plene meritita kaj ke ankaŭ dum la efektivigado de la 5-jara plano ili ne malfruiĝos. En la unuaj 20 tagoj de la monato januaro plenumis la ĉs. fandejoj sian produktadplanon jene: kruda fero 101.7%, kruda ŝtalo 105.3% kaj fandrulita varo 104.1%.

## LENIN EN PRAHA

La tuta laboranta popolo rememoris la grandan fondinton de Sovetunio V. I. Lenin okaze de la 25 jara datreveno de lia morto. La 21an de januaro estis al granda Lenin malvualita plakedo sur la Popola domo en Hybernská strato, Praha II. En tiu ĉi domo en januaro 1912 okazis konferenco de rusaj bolŝevikoj, kiun prezidis V. I. Lenin. Pri la vivo de tiu ĉi genio de la socialista ŝtato festparolis ĉs. ministro por instruado Dro. prof. Z. Nejedlý. Unue li analizis la historion de la revolucia movado en Rusujo kaj klarigis la grandan signifon de la konferenco, laŭ kies koncepto estis fondita nova Centra komitato, kiun estris Lenin kaj kies administron gvidis speciala rusa komitato sub la prezido de J. V. Stalin. Tiam la konferenco decidis fondi eblojn, kiuj finus la vivon de la imperiestra reĝimo en Rusujo, kaj labori al konstruo de la respubliko. Tial la konferenco en Praha fariĝis ĝermo de la granda revolucia epoko en Rusujo. Ministro Nejedlý diris, ke tiu ĉi plakedo sur la domo de Praha heroldu al ĉiu vizitanto de la urbo, ke tie ĉi naskiĝis la nova mondo, nova movado, kiu unufoje estos verko, venkinta en ĉiuj mondkontinentoj. Post ministro Dro Nejedlý parolis ĉefurbestro de Praha Dro V. Vacek, kiu rememoris siajn personajn kontaktojn kun Lenin, al kiu li enmanigadis korespondaĵojn, adresitajn per kovra nomo, pere de la estinta sekretario de socialdemokratia partio J. Havlena. Li ankaŭ rememoris la momenton, kiel li aĉetis al V. I. Lenin la veturbileton al Dresden. Poste prezidanto de la landa nacia komitato Lad. Kopřiva proklamis, ke la plakedo fariĝas protektata objekto flanke de la centra komitato de Komunista partio de ĈSR. Ŝtataj himnoj finis tiun ĉi historian feston de Praha. La Prahanoj poste vizitis la muzeon de Lenin, instalitan en la ĉambro, en kiu Lenin prezidis en la jaro 1912 la traktadon de la Centra komitato de sia partio. Sed ankaŭ en multaj aliaj urboj okazis la rememorfestoj je Lenin. En la Nacia teatro de Praha okazis solena prezentado de la teatraĵo pri Lenin, bildigita en la verko de Pogodin: „La horloĝego de Kreml". La rolon de Lenin aktoris bonege artisto de la Nacia teatro J. Průcha, kiu ludis tiun ĉi rolon jam 60 foje.

## *Ek al paclabor'!*

*Blankaj, flavaj, nigraj, bruligitaj*
*per radioj de varmega sun',*
*aŭ en la minejoj — neviditaj*
*de la suno aŭ de l'pala lun',*

*frate donu ĉiuj vi la manojn*
*en la nomo de la daŭra pac',*
*unuigu vin, samideanoj,*
*spite al la reakci-minac'!*

*Kontraŭ la fantomo reakcia*
*ni rezistu kiel ferlavang'!*
*Nia vok' homama tondru ĉien:*
*For faŝismon! Plu neniam sang'!*

*(Nekonata aŭtoro)*

## TUTŜTATA KONGRESO DE ĈEĤOSLOVAKIAJ ESPERANTISTOJ.

La unua postmilita tutŝtata kongreso de ĉs. esperantistaro okazos en ŝtatlima urbo Liberec de la 4a — 6a de junio 1949. Tiu ĉi tutŝtata kongreso, kiun protektas ĉs. ministro por informoj kaj klerigo Václav Kopecký, promesas esti tre grava okazaĵo de la mezeŭropa esperantistaro kaj meritas, ke venu multaj eksterlandaj delegitaroj por dokumenti, ke Esperanto estas grava faktoro en la tutmonda kultura movado. Popoldemokratia reĝimo de ĈSR garantias al ĉiu eksterlanda vizitanto agrablan restadon kaj ĉiun eblan helpon dum la alveno kaj krozado tra Ĉeĥoslovakio. Venu multnombre, ĉeĥoslovakaj samideanoj invitas vin! La aliĝilojn sendu al Ĉeĥoslovaka Esperanto-kongreso, Liberec.

## EAĈSR, LOKA GRUPO VSETÍN, INVITAS VIN!

Esperanto-Asocio en ĈSR, loka grupo Vsetín, aranĝos esperanto-standon en la ekspozicio „Valaĥio laboranta", okazonta en julio k aŭgusto 1949. La Grupo deziras aranĝi ankaŭ esperantistan laborkunvenon en kadro de la ekspozicio kaj tre ŝatus bonvenigi eksterlandajn samideanojn. Pri anoncitaj vizitoj informas oficiala bulteno de la ekspozicio. Oni fiksos la daton de la kunveno laŭ la alveno de eksterlandaj samideanoj. Notu en via kalendaro kaj venu Ĉeĥoslovakion!

## RADIO OSTRAVA.

Radiostacio Ostrava elsendas dufoje semajne t. e. marde kaj ĵaŭde, escepte de la unua mardo en la monato. Vi povas aŭdi la voĉon de Ostrava je la 23-a horo de MET sur meza ondo 259.1 m 1158 kc 11 kW.

La programon de „Verda stacio" el Praha vi povas aŭdi ankaŭ pere de la stacio Ostrava ĉiam la unuan lundon en la monato je la 23-a horo de MET meza ondo 259.1 m 1158 kc 11 kW.

Viajn dezirojn, kritikojn k proponojn sendu al Ĉeĥoslovaka Radio, Esperanto-Servo, Ostrava.



*Vladimír Slaný, del. de UEA k radioparolanto de Radio Ostrava.*

● Presesaro: En la 3-a nro de ES, Radio Praha, streku la tempon de la elsendo 16.20 kaj metu la ĝustan tempon t. e. 16.30.

## ĈU VI SCIAS DESEGNI?



Provu desegni tiun ĉi aviaton, kiel li kolektas sekan branĉetaron. Sed vi devas desegni ŝin per seninterrompa linio!

Kiu sendos al ni la desegnaĵon, al tiu ni sendos la Konstitution de ĈSR en Esperanto. Kiu sendos al ni la desegnaĵon, tiu ne bezonas sendi al ni la respondkuponon. Do desegnu kaj sendu al Instituto de Esperanto-Servo, Praha II, Malá Štěpánská 7, ĈSR.

Ĉiujn dezirojn kaj proponojn bonvolu adresi al: „Esperanto-Servo". Praha II, Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio, telef.: 330-14. Eldonas: Instituto de Esperanto-Servo-Praha. Responda reprezentanto de Esperanto-Servo: A. Malík, prezid. de IES. Presis: Státní tiskárna (Ŝtata presejo) Praha, Ĉeĥoslovakio.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL